

P. Alberto Maggi OSM

Notoj

Cefalù – Novembro 2008

PAŜU EN LA NOVECO DE VIVO

La nova rilato inter Dio kaj la homoj ne ŝanĝas nur la rilaton inter la homaro kaj la diaĵo, sed ĝi modifas ankaŭ la rilatojn inter la membroj de la komunumo kiu akceptis Jesuon kaj lian mesaĝon. En la grupo de la disĉiploj de Jesuo la rilato inter ili ekskludas tute nete ĉiun formon de superregado aŭ de subpremado.

Se iu ajn imidato de la malnovo havas kiel sekvon la ruinigon kaj pardon de la novo (nova vino, novaj felsakoj), same ene de la komunumo, iu ajn imitado de la fort- aŭ submet-rilatoj ekzistantaj en la socio, estas perfido de la mesaĝo de Kristo. Oni estas veraj disĉiploj de la Sinjoro nur kaj nure se oni estas fratoj, egalaj en la digno, en la rajtoj kaj en la devoj. Ĉiu maljustaĵo al la alia neniel povas esti konfirmita per la mesaĝo de Kristo.

La komunaĵo de la disĉiploj alvenis al tiuj konkludoj kontraŭvole, post longa, malfacila kaj turmentita irvojo, kiel atestas Marko en sia evangelio.

Mk 9,30: Foririnte, ili trapasis tra Galileo, sed li deziris ke neniu tion eksciu. Fakte li instruadis siajn disĉiplojn, kaj diris al ili: "La Filo de homo estas transdonota en la manojn de homo, kaj ili mortigos lin, sed, mortigite, post tri tagoj li leviĝos".

Jesuo kaj la disĉiploj estas irantaj. Laŭ la vojo, por la dua fojo (la unua: Mk 8,31, la tria Mk 10.32), Kristo anoncas al ili sian destinton en Jerusalemo. En la sankta urbo la Mesio ne renkontos la sukceson, per la malvenko de siaj malamikoj, identigataj en iu sacerdota kasto koruptita kaj en iu politika povo maljusta, sed li iros renkonte al morto, al sia eliminado fare de la "homoj".

Jesuo kontraŭmetas "la filo de la homo" al la "homoj". Dum "la filo de la homo" montras la homon kiu, en sia pleneco havas la dian kondiĉon, male "la homoj" estas tiuj kiuj ne konas aŭ ne celas al tiu pleneco por si kaj malebligas la homan evoluon en la aliaj.

32. Sed ili ne komprenis la diron, kaj timis demandi lin.

Sed la Dekdu daŭrigas laŭ sia pensmaniero, kaj povas nek kompreni nek des malpli akcepti iun Mesion malvenkita. Ili ne komprenas ke la Dia regno, la

nova socio kie ne ekzistas la superregado de la homoj super la aliaj homoj, ne povas esti farata de iu superreganta Mesio.

La rezistado de la disĉiploj estas substrekata per la fakto ke, kvankam ili ne komprenas la vorton de Jesuo, ili timas peti klarigojn, maltrankvilaj ke ilia majstro konfirmu tion kion ili timas, kaj ili ne akceptas la riveladon de iu Mesio malvenkita.

33 Ili intertempe venis al Kapernaum. Kaj kiam li estis en la domo ,li demandis ilin: "Pri kio vi diskutis sur la vojo?"

Jesuo estas en sia hejmo. Tiu hejmo jam aperis en la bankedo kiu sekvis la alvokon de Levi (Mk 2,15), kie ĝi rolis samtempe kiel hejmo de Jesuo kaj de Levi. Tie troviĝis du grupoj, la grupo de la disĉiploj, tio estas tiuj kiuj venas de la hebrea popolo, kaj la grupo de la impostistoj, pekantoj, senkreduloj, ktp, kiuj estas la ekskluditaj de la religio kaj de Izraelo.

Pro tio ke la disĉiploj timas pridemandi Jesuon, nun estas la Sinjoro kiu ilin pridemandas.

La evangeliisto insistas pri la esprimo "sur la vojo", kiu ekde Mk 8,27 indikas la itineron al Jerusalemo, kie Jesuo estos mortkondamnita. Dum por Jesuo, sur la vojo estas la irado al la kruco en Jerusalemo, por la disĉiploj ĝi estas la irado al la gloro.

Sur la vojo estas ankaŭ la loko de la senfrukta semado ("Dum li semis, parto falis apud la vojo kaj la birdoj venis kaj formanĝis ĝin" Mk 4,4), situacio de "tiuj en kiuj estas semata la vorto, sed kiam ili ĝin aŭskultas,tuj venas satano, kaj forportas la vorton en ili semita" (Mk 4,14).

Dum Dio estas amo kiu sin metas je la servo de la homoj, satano estas la povo kiu ilin dominas kaj ilin submetas. Por Jesuo ĉiuj kiuj estas sub la povoregado, jen ĉar ili ĝin tenas, ĝin alstrebas aŭ al ĝi ili submetiĝas, ili rezistas al lia vorto, kiun ili vidas respektive kiel minacon al propra superregado, al propraj ambicioj aŭ al propra sekureco.

34. Sed ili silentis. Survoje fakte ili diskutadis inter si kiu estas la plej granda.

La silento al la demando de Jesuo evidentigas ilian obstinon (kp. 3,5): ili diskutadis pri kiu inter ili estas de supera rango. En la juda palestinana mondo estis tre konsiderata la graveco de la persono kiu devis esti substrekata en ĉiuj vivokampoj: en la kulto-kunvenoj, en la justic-administrado, en la solenaj manĝoj (bankedoj). Kaj ĉiun fojon ekestadis daŭre disputoj pri la honor-nivelo kaj pri la graveco donenda al ĉiu unuopulo (kp. En Lk 14,7-11 la kurado al la unuaj lokoj kaj en Mk 12,38-39, la dezirego de la honorlokoj flanke de la skribistoj).

Tiuj kiuj vidas en Jesuo iu potenculo, volas ili mem esti potencaj.

Kiu akceptas iun tirano al kiu submetiĝi, tiu estos tirano kun tiuj kiuj estas liaj subuloj.

La disĉiploj, kiuj vidas Jesuon kiel la triumfantan Mesion, kiel la gloran Izraelan reĝon, kultivas siavice la ambicion superregi kaj esti potencaj.

La disĉiploj akompanas Jesuon sed ne lin sekvas, ili estas apudaj, sed ne al li proksimaj. Iliaj itineroj estas kontraŭaj kaj iliaj celoj ne akordigeblaj.

La fakto ke la disĉiploj diskutas montras ekzistantan konflikton inter ili, kiu malhelpas la manko de interkonsento.

Temo de la diskuto estas la ambicio esti la plej granda en la grupo. Ilia pretendo radikale kontraŭas la kondiĉon metitan de Jesuo por lin sekvi: "Se iu volas veni post mi, li abnegaciu sin mem" (Mk 8,34).

35 Tiam, sidiĝinte li alvokis la Dek du kaj diris al ili: "Se iu volas esti la unua, tiu estu la lasta el ĉiuj kaj la servanto de ĉiuj".

Estas sufiĉe strange ke, kvankam ili estas ĉiuj en la sama domo, Jesuo devas voki la dek du.

En la kunteksto tiu ĉi voko ne supozas fizikan malproksimecon (ili estas en la domo), sed malproksimeco kaŭzita de la manko de aniĝo al la destino de Jesuo, kiu tiel frustracias la intencon de Jesuo ke ili restu kun li (Mk 3,14).

La disĉiploj estas malproksimaj de Jesuo, kiel Petro, kiu "sekvadis Jesuon de malproksime..." (Mk 14,54), ĉar ili ne akceptas la valorojn de la majstro kaj rezistas akcepti la destinton de la Filo de homo.

La ambicio kaj la deziro je honoroj radikale kontraŭas la kondiĉon metitan de Jesuo por lin sekvi (Mk 8,34), kaj pro tio ili igas liajn vortojn ne kompreneblaj. Fakte la evangeliisto ne indikas ke la Dek du alproksimiĝas al Jesuo post la voko.

Jesuo korektas la aspiron de la disĉiploj al grandeco dirante al la Dek du ke ili devas rezigni ĉiun rangopretendon. Li ne ekskludas la eblecon ke iu el la komunumo povu esti la "unua", sed ne la "plej granda", kio estis la diskutotemo inter la Dek du.

La Dek du alstrebas al la loko plej alta, plej grava, ĉiu volas esti super la aliaj.

Jesuo metiĝas en alian perspektivon, tiu de la apudeco al li (la unua) kaj li asertas ke la loko de la unua en la komunumo ne estas rezervita al iu individuo, sed al ĉiuj kiuj libere kaj pro amo fariĝas servantoj de la aliaj, kiel "la filo de homo kiu ne venis por esti servata, sed por servi" (Mk 10,45).

La unua en la komunumo estas tiu kiu iĝas lasta inter ĉiuj kaj servanto de ĉiuj. Tiel neniu povas esti la "plej granda". La disĉiploj estas malproksimaj de Jesuo ĝuste ĉar ili klopodas esti la plej grandaj: por esti al li proksimaj, por esti la unuaj malantaŭ li, necesas esti la kompleta malo.

Rilate al la vorto diakonos oni devas noti ke oni ne celas tiun, kiu pro socia kondiĉo estas la servanto de la aliaj, sed kiu libere, pro anima impulso, sin metas je la servo de ĉiuj membroj de la komunumo (servanto). La disĉiplo kiu iĝas la lasta el ĉiuj, kaj servanto de ĉiuj, havas la saman sintenon de sia majstro kaj do li sin metas en la lokon plej proksiman al Jesuo.

Ĉi tiu instruo bedaŭrinde estos nek komprenata nek akceptata, kaj Jesuo devos ĝin rediri post la tria anonco de sia pasiono, kiam du disĉiploj, Jakobo kaj Johano, sin montrante surdaj kaj blindaj al la vortoj de Kristo, kiu estis klare dirinta ke en Jerusalemo li estos mortigata (Mk 10,32-34), alproksimiĝos al li por peti al li la plej gravajn lokojn en lia regno (Mk 10,35-37), tiel kaŭzante la malkonkordon kaj la indignon de la aliaj membroj (Mk 10,41). Kaj Jesuo renovigos tiam la instruon pri la evoluo en sia komunumo.

“Tiam Jesuo ilin vokis al si kaj diris al ili: “Vi scias, ke tiuj kiuj estas konsiderataj la regantoj de la nacioj regas super ili kaj iliaj granduloj ilin subpremas.

Sed inter vi ne estas tiel, sed tiu kiu volas iĝi granda inter vi estos via servanto, kaj kiu volas esti la unua inter vi estos sklavo de ĉiuj.

Fakte ankaŭ la Filo de homo venis ne por esti servata, sed por servi kaj por doni sian vivon kiel elaĉeton por multaj” (Mk 10,42-45).

Ja tri fojojn Jesuo rediras inter vi, ekskludante radikale ĉiun similecon en la vivo de la komunumo kun la reg- kaj subprem-sistemo uzata en la socio.

Kiam la komunumo akceptas tiun mesaĝon, ĝi ne organiziĝas per strukturoj de regado, sed per amaj, ne povaj sed servaj, kiel estas dirite en la Libro de la Agoj, en kiu oni prezentas la komunumon elektitan de Petro post la liberigo de lia kaptiteco: “Post pripensado, li iris al la domo de Maria, la patrino de Johano, alnomata Marko, kie estis multaj kunvenintaj kaj preĝantaj. Kaj kiam li frapis ĉe la ekstera pordo, servantino nomata Roda alproksimiĝis por ekscii pri kiu temas” (Ag 12,12-13).

La tri rolantoj, laŭ la stilo de Luko, reprezentas la komunumon. Iu komunumo estrata de la amo (la patrino), alcentrita al la evangelio (Marko), kaj esprimiĝanta en la servo (Roda). Fakte la domo estas de Maria, la patrino, de Marko, la evangeliisto, kaj la tria rolanto, Roda, prezentas la servadon. Tiu kiu estras la eklezion estas la amo, la patrina amo, tiu kiu amas kaj akceptas la filojn tiaj kiaj ili estas. Tiu komunumo havas la garantion esti alcentrita sur al la bona sciigo de Jesuo, kies atestanto estas Marko, kaj povas esprimiĝi nur per la servado libere plenumata pro kaj kun amo.

36. Kaj, preninte knabeton,

Dum la Dek du Jesuo devis voki, kun tiu kiu estas la unua, la plej proksima, tio ne necesas, tiu estas je lia flanko kaj ne estas necese lin voki. Se la malproksimeco de la disĉiploj montris ilian nekomprenon kaj kontraŭecon je la vortoj de Kristo, la proksimeco de la knabeto signifas male ke tiu havas la saman servosintenon de Jesuo.

Sed kiu estas tiu knabeto?

La greka vorto paidion priskribas simplan knabeton aŭ junan serviston, kiel en la aramea talya kiu havas la saman duoblan signifon kiel la greka. Rilate la aĝon, la paidion ne necese estas eta infano. Marko diras paidion knabinon dekdujaran (Mk 5,39.42).

La paidion/ knabeto estas iu individuo kiu pro aĝo kaj socia rolo estas la lasta en la socio, la malplej taksata, la malplej grava.

Jesuo en tiu ero ne parolas pri knaboj ĝenerale, sed pri aparta kategorio, indikita en la teksto per la difino “unu el ĉi tiuj” (Mk 9,37).

li starigis ĝin meze kaj ĉirkaŭbrakinte ĝin, li diris al ili:

Jesuo starigas la knabeton en la mezon, la lokon de la Majstro, lin prezentante kiel modelon por la Dek du. La knabeto havas lian saman servosintenon kaj Jesuo lin ĉirkaŭbrakas, tiel plenumante geston de amo kaj de identigo.

37 "Kiu akceptas unu el tiuj knabetoj en mia nomo, tiu akceptas min; kaj kiu akceptas min, tiu akceptas ne min, sed Tiun kiu sendis min".

Jesuo sin identigas kun la disĉiplo kiu havas lian saman servostintenon, esprimitan bilde de la vorto knabeto, deklarante ke en tiu, taksata la lasta kaj la sensignifa en la socio, manifestiĝas la ĉeesto de la Sinjoro.

Sed ne nur. Jesuo, sin prezentante kiel la loko kie okazas la unuiĝo inter Dio kaj la homo, identigas la knabeton kun la Patro, Tiu, kiu lin sendis, tiel malkaŝante la vizaĝon de Dio: ne tiu kiu regas la homon, sed iu Sinjoro kiu metiĝas je lia servo, por ke tiu kiu sin taksas servanto, sentu sin sinjoro.